Mi tuj ekindignos:
„Demetu!
Demetu!
Demetu rapide
la maŝon, banditoj!"

Por ĝi — por la Vivo —
mi farus ja ĉion.
Mi flugus
ĉielen per prova maŝino,
mi sola enirus
eksplodan raketon;
mi serĉi dezirus
tra l'kosmo
plej foran planedon.

Kaj tamen mi sentos
la tiklon agrablan
rigardi
la foran
lazuron ĉielan.
Kaj tamen mi sentos
la tiklon agrablan:
mi vivas ankoraŭ,
mi estas ankoraŭ.